# Rio Esperantista

ASOCIO ESPERANTISTA
DE RIO-DE-ĴANEJRO

Februaro – Marto 2014

*Kultura Revueto*

*De*

AERĴ



Preĝejo "da Candelária"

# OFICIALA ORGANO DE
# ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-ĴANEJRO

**Februaro – Marto 2014**

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO

**★ Rua Teófilo Otoni, 135 / 302 ★**

**☏ 2467-4296 – 💻 aerjrj@hotmail.com e www.aerj.org.br**

**Redaktas:** *Paulo Sergio Viana*
**Aranĝas:** *Alfredo Aragón*


## RIO ESPERANTISTA

### VORTOJ DE LA REDAKTORO

En la komenco de la konata, klasika verko de Machado de Assis - "Postmortaj Rememoroj de Brás Cubas", troviĝas neforgesebla ironieto. Relegu ĝin, samideano: "... *ĉi tiu libro eble ne atingos la cent legontojn de Stendhal, eĉ ne kvindek, eĉ ne dudek, kaj se tiom, dek. Ĉu dek? Eble kvin.*" Vi certe jam legis kaj relegis tiun mirindan verkon – en la portugala lingvo kaj en Esperanto, kaj vi scias, ke miloj, milionoj da homoj jam ĝuis ĝiajn senkomparajn paĝojn, tute malkiel antaŭvidis la aŭtoro.

Ĉi tiu penso venis al mi en la kapon dum la lastaj semajnoj, de kiam aperis la lasta numero de "Rio Esperantista". Dum tiu tempo mi fervore atendis reagojn de la legantaro. Supozeble, la reaperigo de nia bulteneto, eĉ se modesta kaj eta, devus veki ĉe la legantaro intereson kaj reagojn. Ili tamen bedaŭrinde ne atingis nin. Atingas nin sole nur longa, peza silento. Eĉ iom maltrankviliga silento, ni devas konfesi. Ĉu la bulteno kontentigas la publikon? Ĉu ni povus plibonigi ĝin? Ĉu ni devus tute radikale ŝanĝi ĝian formon kaj enhavon? Kritikoj estus bonvenaj; kunlaborado, eĉ pli. Silento estas kruele akra. Ĉu ni havas dudek legantojn? Ĉu dek? Ĉu kvin? Ni ne zorgas pri ciferoj, efektive. Plaĉus al ni pli aktivaj, reagemaj legantoj, kiuj diru al ni kiel pli bone fari nian laboron. Jen tamen ni kuraĝe lanĉas novan numeron. Niaj oreloj streĉiĝas denove por eventuala brueto el inter niaj karaj legantoj.

–*P.S.V.*

### VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Nova jaro komencas por AERĴ kaj dum tiu ĉi jaro bonajn defiojn ni havos: la asocio estas pli aktiva kaj pro tio oni uzas pli la sidejon kaj bezonas pli da mono por la riparaj kaj purigaj elspezoj; alia granda defio estos la organizado de la Brazila Kongreso de 2015, kiu okazos en Rio-de-Ĵanejro. Alia feliĉa ideo de la estraro, kiun ni esperas, esti ankŭ fruktodona, estas la modifo de niaj kulturaj kunvenoj, ili ne plu okazos nur en la sidejo, sed en la grupoj kaj kursoj de la ŝtato, kaj tiel ni klopodos alporti AERĴ-n al la grupoj. – Pro la starigo de la nova statuto ni

organizos novan estraran grupon. Tiel novaj homoj helpos nin kaj ni sukcesos novajn kunlaborantojn, krom tiuj kiuj jam laboras ĉe ni. Sed se ni sukcesos daŭrigi la taskojn, kiujn ni jam komencis, la ŝtata movado estos kontenta. – Laŭ decido de nia estraro, ne plu funkcias la instrua komitato, sed la apogo kaj zorgo pri tiuj, kiuj instruas la lingvon en nia ŝtato ne haltis. Instruado de Esperanto estas baza fundamento de nia movado. AERĴ dediĉos sin pli kaj pli por profesiigi aŭ perfektigi la kursgvidantojn. Ni jam difinis la daton 27ª de aprilo por okazigi Trejnadon por kurs-gvidantoj, denove proponos altnivelan kapabligan kurson de profesoro Fernando Pita, kaj planas organizi KER -Ekzamenon en nia ŝtata renkonto en majo. - Kiel novjara mesaĝo, estas deziro nia ke la esperantista komunumo tenu nian aferon senlace kaj konstante. Estontajn okazojn ni ne scias, sed cer-te Esperanto estos ĉiupopola parolata lingvo. Kiam? Certe dependos de niaj klopodoj kaj de la homa matureco. Ĉiu esperantisto rajtas la honoron subteni la revon de Zamenhof - kiu estas la revo de la tuta homaro, ĝis la fina venko. Fruktodoan kaj sukcesan jaron por ĉiuj ni!

## EL NIAJ KLASIKULOJ



**Kabe**

### *MALJUNA AVO KAJ NEPO*

*Estis iam homo maljuna kiel la mondo. Liaj okuloj ne vidis klare, surdaj estis la oreloj kaj la genuoj tremis. Kiam li sidis ĉe la tablo li apenaŭ povis teni la kuleron, disverŝis supon sur la tablotukon kaj eĉ iafoje ĝi refluis el lia buŝo. Tio estis abomena por lia filo kaj bofilino kaj fine ili sidigis la maljunulon en angulon post la forno kaj donis al li manĝaĵon en argila pladeto kaj neniam sufiĉe; li mal-ĝoje rigardis al la tablo kaj liaj okuloj fariĝis malsekaj. Foje liaj tremantaj manoj ne povis teni la pladeton, ĝi falis teren kaj rompiĝis. La juna virino insulte lin riproĉis, li diris nenion. Oni aĉetis al li lignan pladeton por kelke da heleroj, kaj de tiu tempo li devis manĝi el ĝi. Foje kiam ili sidis en la ĉambro, ili vidis, ke la kvarjara nepeto kunmetas sur la planko lignajn tabuletojn. "Kion vi faras?" – demandis la patro. "Mi faras trogeton, – respondis la infano – el ĝi manĝos la paĉjo kaj panjo, kiam mi estos granda." La geedzoj momenton rigardis unu la alian, ekploris kaj tuj ili alkondukis la avon al la tablo. De tiu tempo ili manĝis kune kun li kaj ne riproĉis lin, se li iom disverŝis.*

*(El "Elektitaj Fabeloj" de Fratoj Grimm, tradukis Kabe.)*

**CETERE...**
**ĈU VI JAM ALIĜIS AL AERĴ POR 2014 ?**

# ARTIKOLO – I

## ĈU LA ANGLA LINGVO?



Frederico Ferreira

Nuntempe aperis diversaj artikoloj pri la angla lingvo, kiu eble, laŭ la konkludo de la artikolisto, solidiĝos kiel la internacia lingvo post nelonga tempo, pro natura (mi ne deziras pridiskuti la kaŭzojn) adoptiĝo de la angla por la homaro kiel ĝia dua lingvo. Sed kiel ni povas kontraŭstari tiun argumenton? Ĉu ĝi estas vera? Kion oni povas fari por ekŝanĝi la pejzaĝon kaj meti Esperanton sur ĝian propran lokon: tiu de neŭtrala internacia lingvo?

Interreto kaj inteligenta telefono alvenis por ŝanĝi nian vivon kaj intensigi la interkomunikiĝkabablon. Sed, kiel oni povus uzi tian kapablon favore al Esperanto? Ĉu oni lerte scias kiel uzi la sociajn retojn, *twitter*, *google*+, ktp por disvastigi Esperanton kaj konservi ĝin viva?

La unua kaj plej grava rekomendo estas, ke la esperantistoj devas esti tie, kie la aliaj personoj estas, do, uzi la rimedojn utiligatajn de la esperantaj nekonantoj por disvastiĝo. Ĉiuj aliaj rekomendoj estas komplementaj al tiu.

Due, la esperantistoj devas bone uzadi *facebook* por elmontro kaj trejnado de la lingvo. Mi, kiel ekzemplon, citas la komunumon de studantoj de la rusa lingvo en *facebook*, kie troviĝas kelkaj el tiaj komunumoj (kelkaj brazilanoj!). Tiaj komunumoj devus esti tute malfermitaj (ne gvidataj), kaj komence centritaj de la esperanto-organizaĵoj por diskonigo. Kiel variaĵon, oni devus fari komentarion en Esperanto pri kelkaj novaĵoj, precipe rilate al monda politiko, ekologio (ne neŭtralaj temoj) kaj atendi respondon (pere de socia reto aŭ pere de la ejo mem). Mi vidas, ke ne ekzistas klara procedo por kontesti novaĵon en interreto. Oni povas fari tion en la lingvo de la ejo mem kaj aŭ en iu ajn lingvo, ne gravas.

Trie, blogoj; ja efektiva maniero disvastigi novaĵojn de la movado inter la esperantistojn aŭ produkti originalan tekston en Esperanto. Post la legado, oni povas «ŝati» kaj fari komentojn pri la teksto, kaj eblas diskutado kaj uzado de la lingvo.

Fine, mi diras, ke la movado devas akompani la vivmanieron de la homoj. Esperanto, kiam ĝi naskiĝis, estis novaĵo, rezulto de la inteligenteco de Zamenhof. Oni ne lasu ĝin fermita inter ni aŭ protektita de la teknologio. Ni ŝanĝu nian manieron subteni la movadon, portante al ĝi la ilojn kiuj favoros la movadon mem.

*(http://thefinanser.co.uk/fsclub/2012/09/the-worlds-global-language-is-english.html*
*http://www.ft.com/cms/s/0/9639babc-31ac-11e3-817c-00144feab7de.html#axzz2pHjXiSHU*
*http://www.courrierinternational.com/article/2012/03/15/why-the-french-are-right-to-resist-global-english*
*http://www.bbc.co.uk/news/magazine-12017753*
*http://blogs.uww.edu/library/archives/12677)*

# EKONOMIO

## LA EKONOMIO EN TAJVANO



Teddy Nee

*(estas internacia magistra studento de la administrada negoco kaj verkisto de www.neeslanguageblog.com)*

### Eksportoj kaj importoj

Tajvano estas la 28a plej granda ekonomio en la mondo kaj la 6-a plej riĉa lando en Azio. En 2012, proksimume 99% el la eksportoj estis de industria sektoro, dum agrokulturaj varoj formis ĉirkaŭ 1%. Pli ol 77% de Tajvanaj importoj estas de agrokulturaj varoj kaj krudaj materialoj, sekvata de kapitalaj varoj kaj konsumvaroj.

### Informada kaj Komunikada Teknologio

Tajvana ekonomio tre dependas de la internacia komerco. Pli ol 70% el Tajvanaj eksportoj formas kapitalajn varojn, koncentrante je la Informada kaj Komunikada Teknologia (ITK) sektoro. Tajvano produktas 94% el la mondaj ĉeftabuloj kaj komputiloj. Kaj la Taiwan Semiconductor Manufacturing Company (Tajvana Semikonduktoro-Fabrikada Firmao) produktas la plejmulton el la komputilaj blatoj uzataj de Usonaj firmaoj kaj Tajvano havas ankaŭ kelkajn tutmondajn markajn nomojn por komputiloj, kiel Acer kaj Asus. Aldone, Tajvana negoco tre fidas al transmaraj fabrikadoj. En sektoro kiel ITK, ĝis 85% de Tajvanaj eksportoj estas fabrikataj ekster Tajvano.

La kompleta referenco estas de: *"Taiwan's Economic Opportunities and Challenges and The Importance of the Trans-Pacific Partnership (Tajvanaj Ekonomiaj Oportunoj kaj Defioj kaj La Graveco de la Transpacifikaj Partnereco)"*

# ARTIKOLO – II

## PROJEKTO ESPERANTO DUM "BIENAL 2015"



Márcio Santos

"Bienal do Livro do Rio de Janeiro" (Rio-de-Ĵanejra Libro-Foiro) estas rara okazaĵo. Tiu evento, ĝenerale okazanta dum la monatoj aŭgusto kaj septembro, altiras gigantan publikon: formiĝas en diversaj urboj de nia lando ekskursoj, kiuj alportas lernantojn kaj studentojn, krom personoj de ĉiuj aĝoj kaj sociaj grupoj, interesiĝantaj pri literaturo, kulturo kaj arto, al Riocentro grandega loko por ekspozicioj kaj eventoj en la urbo Rio-de-Ĵanejro.

Se oni kalkulas ĝian publikon je centmiloj da personoj vizitantaj la eventon, tie laŭkutime okazas multe da librodebutoj, krom debatoj inter verkistoj kaj ilia publiko, literaturaj rondoj, kaj pliaj similaj eventoj.

Ja por kunligi tiel grandan publikon, Rio-de-Ĵanejra Dujara Libro-Foiro montriĝas kiel bonega spaco por disvastigo de Esperanto. Partopreno de esperanta institucio en tiu okazaĵo estos fantasta ilo por - rekta kaj nerekta - propagando por nia afero, prezentante la Internacian Lingvon al publiko jam alkutimiĝinta al kulturaj supernaciaj fenomenoj, donante al Esperanto senegalan videblecon, je malalta kosto, kiam komparata al volumo da personoj tie paŝantaj.

Pensante je disvastigo de nia afero al tiel granda publiko, AERĴ intencas starigi budon dum la venonta realigo de la evento, dum la jaro 2015, kaj por tio, oni kalkulas pri la helpo de la nacia esperantista komunumo. Oni starigas do kampanjon "Esperanto en la LIBRO-FOIRO", celanta ekkonstrui fonduson por akiro de tiu grava spaco por propagando, kiu, hodiaŭ (februaro, 2014) estas taksata je R$20.000,00 plimalpli.

Evidente, nia institucio ne povas, sola, pagi tiajn kostojn, do ni petas ke minimume 100 samideanoj ĉirkaŭprenu kun ni tiun aferon, dividante kun ni tiujn kostojn, laŭlonge de 2014, per la kvanto de R$ 200,00 por ke, fine de tiu jaro oni disponu pri la tuta necesa kapitalo por konfirmi nian partoprenon en la evento. (Partopreno kiu eĉ povos esti profitdona, des pli ke la disvendo de libroj kaj pliaj lernomaterialoj certas!)

Se vi, esperantisto kiu kredas je la idealoj de Zamenhof, disponas helpi per R$ 200,00 vi ricevos titolon "soci-protektanto" de tiu kampanjo, kaj, dum la jaroj 2014-15, ricevos per interreto ĉiun informan kaj disvastigan materialon produktotan de AERĴ, kies honora membro vi estos. Sed oni akceptas ankaŭ ian ajn kunlaboradon, ian ajn valoron, el iu ajn esperantisto el nia lando, ĉar tiu estas unika okazo por disvastigo de niaj idealoj.

Tiel, se vi deziras ĉirkaŭpreni kun ni tiun ideon, kontaktu nin! Dankon!

✪

## INSTRUI ESPERANTON POSTULAS SINPREPARON, NE NUR VOLON



Carlos Correa Filho

En niaj jaroj de lernado, disvastigado kaj vivado ene de esperantismo, ofte ni vidas plurajn personojn, ĉu pro la facileco de la lingvo aŭ ne, kiuj volas instrui la lingvon sed vere ne havas sufiĉan fluecon, konon aŭ didaktikon por instrui nian lingvon.

Ne kiel ĉe aliaj etnaj aŭ "naturaj" lingvoj, tio estas, lingvoj, kiuj apartenas al ia homgrupo, regiono aŭ lando,

esperantistoj ne naskiĝas tiaj. Krom tio, la kvanto da esperantistaj kreskas nur laŭ la decido de interesuloj lerni kaj praktiki la lingvon, ne alimaniere. Aliflanke, eĉ ni ne distingas niajn parolantojn kiel naturajn, ni faras tion per la uzo de la adjektivo "denaska", tio estas, iu, kiu parolas esperanton ekde sia naskiĝo.

En tiu okazo, laŭ la determino de la propra nomo, estas necese, ke la infano parolu Esperanton ĉiutempe kaj por fari tion, ĝiaj gefamilianoj devas esti vere parolantoj de la lingvo, laŭ la plena signifo de la vorto.

Por ĉiuj aliaj, kiuj ne parolas Esperanton, estas necesaj multaj horoj da sindediĉo, legado kaj lernado por gajni la plenan nivelon, kompare kun la C2 de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

Kaj, por ke tiu lernado okazu, bonajn instruistojn oni bezonas, ne nur pri la lingvo mem, sed ankaŭ pri lernmanieroj, kaj la utiligo de ĉiuj helpiloj, kiuj estos disponeblaj, inkluzive de la novaj teknologioj kiel Skajpo (Skype), Fajsbuko (Facebook), ktp.

Bonaj instruistoj estas tiuj, kiuj ekvilibras ĉiujn tiujn premisojn kaj samtempe konservas la fajran volon de la gelernanto por ekkoni novajn aferojn.

La usona verkisto Nicholas Sparks, en sia libro "Dear John" (Kara John), publikigita en 2007 asertas: "bonaj profesoroj estas estimindaj. Ili inspiras kaj ludigas nin, kaj vi lernas multajn aferojn, eĉ ne perceptante tion".

Pro tio, karaj amikoj, antaŭ ol akcepti la lernadon de la lingvo, vi devas prepari vin kaj scii kiel lerni ĝin. Por ke niaj gelernantoj estu kapablaj ne nur komunikiĝi en Esperanto, sed por ke ili povu ja vivi ĝin.

---

## RECENZETO

## "SALUTON, SAMIDEANO!"



Paulo Sérgio Viana

Kultura Kooperativo de Esperantistoj lanĉis antaŭ kelkaj semajnoj la verkon de Aloísio Sartorato "Saluton, samideano!", kaj tio meritas komenton. Fakte, tiu libro jam estis disponebla en la retejo de la kooperativo de iom longa tempo, sed tre bonvena estas la aperigo paperforma, ĉar estas konata la malfacileco de multaj samideanoj legi librojn per komputilo. (Efektive, bedaŭrinde, eĉ la merkato de paperlibroj inter ni lastatempe montriĝas tre modesta.) Ni substreku, ke la eldonon pagis mecenato Neide Barros Rego - konata poeto kaj kantisto, kiu al ni ĉiuj konstante donas ekzemplon de sindediĉo al la riĉigo de la Esperanta kulturo. Ni varme gratulas ŝin!

La verko estas nepre leginda. Temas pri tekstoj produktitaj dum lia tuta vivo de modela Esperantisto. Aloísio Sartorato donacis sian vivon al nia movado, instruante la lingvon (lia "Esperanto para Principiantes" estas plej

furora didaktika libro en la brazila movado) kaj formike laborante kiel volontulo ĉe Brazila Esperantista Junulara Organizo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro. Nun li lasas al ni specon de memorlibro: li kunigis en ĝin artikolojn, historiajn esplorojn, poemojn, literaturajn tradukojn. Aparte gravaj estas liaj dokumentoj pri brazilaj intelektuloj, kiuj apogis Esperanton aŭ mem estis Esperantistoj. Ĉi tie oni trovas altvalorajn argumentojn por nia afero.

La volumo prezentas belan kovrilon, nome foton faritan de la aŭtoro mem, kiu poeziece montras lian senteman, delikatan spiriton. La lingvo estas simpla kaj modela, la preso klara kaj la bindo fortika. Ni esperas, ke Kultura Kooperativo de Esperantistoj proponu al ni pliajn tiajn juvelojn.

Ĉiu samideano devus akcepti la saluton de nia estiminda Aloísio Sartorato, aĉetante por si mem kaj por donaco al amikoj ĉi tiun belan libron. Li meritas multe pli ol tion.

## IOM DA POEZIO

### ARABO KAJ KAMELO



RETO ROSSETTI

Arabo rajdis sur kamelo,
strebante al oaza celo,
sed en dezerto la malhelo
al li inundis.
La tendon do por nokta ĉelo
li vigle muntis.

Al la arabo, kiu tendas,
nun milde la kamelo plendas:
"Ho mastro! Froston mi eksentas!
Ĉu do en ordo,
se nur la nazon mi etendas
tra via pordo?

Konsentas li kun bona koro,
sed baldaŭ sonas bleka ploro:
"Nun frosto pinĉas kun rigoro
orelojn du!
Mi ŝirmu ilin, ho sinjoro,
en tendotru' !

La homo cedis malsevere,
Sed… sonis plua plendo kvere:
"La akro mordas tre sufere
nun mian kolon!
Ĉu mi ĝin ŝovu el ekstere
sub tendotolon?

Dum tempo regis paca ĉarmo,
sed poste la kamel' kun larmo
lamentis: " Pikas la malvarmo
piedojn du!
Permesu ŝirmon de la karno
en tendo, ĉu?"

Do pro kompato la arabo
po iom cedis al la rabo,
ĝis en la tuta tendokavo
kamelo nestis;
kaj nia simpatia knabo
ekstere restis!

Jes, ofte bonkorulo trovas
kolegon, kiu sin enŝovas,
kaj lin el loko grade movas
por sin enbazi.
Atentu: tio sama povas
al vi okazi!